# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Afta febro

Afta febro estas infekta malsano de parhufuloj. Simptomoj estas vezikoj en buŝa kavo, sur lango, piedoj kaj lakta glando, ĉe remaĉuloj ankaŭ en rumeno, kaj alta temperaturo. Kaŭzanto estas viruso el la familio Picornaviridae, la genro *Aphtovirus*. La viruso estas ekstreme infekta. Plej ofte ĉiuj bestoj (100 %) en grupo malsaniĝas, nur 0.1 – 5 % da plenkreskuloj mortas, sed ĉe idoj la viruso atakas koron, pro tio 50 – 70 % da idoj pereas. La malsano malaltigas utildonecon de la bestoj. Ekonomaj domaĝoj estas grandegaj. Neniigado de fokusoj de la malsano postulas aranĝojn, kiuj influas vivon de loĝantaro en la fokusoj kaj protektaj zonoj, kaj konsiderindajn financajn kostojn. Oni ne devas eksporti sentemajn bestojn kaj iliajn produktojn. Ekde la jaro 1991 Ĉeĥa Respubliko estas la lando, kiu estas oficiale senhava aftan febron, sed printempe en la jaro 2025 afta febro aperis en najbaraj ŝtatoj (en Germanio, Hungario kaj Slovakio), pro tio oni danĝerecon de tiu ĉi malsano ne devas subtaksi.

**Kiam:** la 4-an de februaro 2026 je **18.00** (UTC+1), la klubejo estos malfermita ekde 17.45
**Prelegonto**: Oldřich Arnošt Fischer
**Lingvo:** esperanto
**Kie:** Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato

Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la . La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi estos registrata.

★

# Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- La 1-an — 8-an de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

Ĉu vi scias pri esperantista programo, precipe internacia, kiu povus esti interesa por ni? Informu nin.

★

# Cetera programo en februaro

La 11an **Laŭ spuroj de Menonitoj** – Robert Kaminski, kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Ribeluloj** – Oldřich Arnošt Fischer, la klubejo

La 25an **Trampoj** – Vladimír Türk, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

# Programo en marto

La 4an **Jarkunveno de membroj**, la klubejo

La 11an **Universala kongreso en Graz** – Ewald Schick (AT), kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Prezento de instrumetodo** – Anton Oberndorfer (AT), la klubejo

la 25an **La edzino de la tempvojaĝanto** (komparo de la esperanta kaj la ĉeĥa tradukoj) – Mirka Tomečková, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

Pripensu jam, kiel vi povus kontribui al la programo. Tute mankas programo en la klubejo ekde aprilo kaj restas ankoraŭ liberaj kelkaj datoj por retaj renkontiĝoj. Ne hezitu proponi. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY
mailer lite